

**MI NE VENIS PORTI PACON AL LA TERO, SED DIVIDON.
- Komento pri la Evangelio de p. Alberto Maggi OSM**

Luko 12,49-53

En tiu tempo Jesuo diris al siaj disĉiploj: "Mi venis ĝeti fajron sur la teron, kaj kiom mi deziras, ke ĝi jam estu brulanta! Mi havas bapton, en kiu mi estos baptita, kaj mi estas tiom angora, ĝis ĝi estos plenumita.

Ĉu vi pensas, ke mi venis por porti pacon al la tero? Ne, mi diras al vi, sed dividon! Ekde nun se en familio estas kvin personoj, ili estos dividitaj tri kontraŭ du kaj du kontraŭ tri; dividiĝos patro kontraŭ filo kaj filo kontraŭ patro, patrino kontraŭ filino kaj filino kontraŭ patrino, bopatrino kontraŭ bolfilino kaj bofilino kontraŭ bopatrino.

Johano la baptisto anoncis kiel agadon de la mesio tiun de la bapto per la Sankta Spirito kaj la fajro. La Sankta Spirito estas vivo-fonto por tiu, kiu akceptas ĝin, kaj detrua fajro, puna fajro por tiu, kiu malakceptas ĝin, kiel Johano poste klarigis *"kaj la tritikŝeloj brulos kiel neestingebla fajro"*.

Ankaŭ la disĉiploj de Jesuo, Jakomo kaj Johano, estis petintaj al sia Sinjoro detruan fajron, fajron, kiu detruu tiujn, kiuj ne akceptis lin. Ili petis Jesuon *"Sinjoro, ĉu vi volas, ke ni diru, ke fajro malsuprenvenu el la ĉielo kaj konsumu ilin?"*

Do, ankaŭ Jesuo anoncas fajron, sed ĝi ne estos mortofajro sed fajro favoranta la vivon. La anonco de Jesuo antaŭas la scenon de Pentekosto, kiam sur la komunumon malsuprenvenos la fajro de la Spirito. En la tago, kiam la juda komunumo solene festis la donado de la leĝo sur la monto Sinajo, en la kristanan komunumon malsuprenvenis la Spirito.

Estos nova rilato kun Dio, la rilato kun Dio ne plu estos tiu de obeado al ĝia leĝo kaj de respektado de ĝia leĝo, sed ĝi estos rilato de simitado al la Patro, kaj de praktikado de amo simila al lia. Kaj por ke tio estu ebla, la Patro ne regas siajn homojn per farado de leĝoj eksteraj al la homo, kiujn homoj devas respekti, sed per transdonado de sia Spirito, de sia mema amkapablo.

Jen, Jesuo anoncas: "*Mi venis porti fajron al la tero*", kaj ĉi tiu fajro estas la frukto de lia morto. Kiam Jesuo en la lasta momento dissendos sian Spiriton al tiuj, kiuj akceptas ĝin, Jesuo brulas pro la deziro, ke ĉi tiu fajro jam estu brulanta. Do, ne temas pri la detrua fajro de la juĝo, sed pri la fajro de la Spirito, vivo-forto. Sed ĉi tiu fajro estas frukto de lia morto, kiel Jesuo anoncas.

"Estas bapto, kiun mi devas ricevi", laŭvorte *"Estas bapto, per kiu mi devas esti baptita"*, aŭ eĉ pli bone *"Estas enmergo, en kiun mi devas esti enmergita"*.

Jesuo aludas je la momento de sia morto, kiam li estos forportita de la okazaĵoj, kiuj igos lin doni sian vivon. "*Kaj kiom mi estas angora...*", ĉi tie ĉi tiu traduko ne redonas la tekston. En la okazo de Jesuo ne temas pri angoro, la greka vorto signifas fortan deziron, kiu premas homon, kiu regas la homon. Do, Jesuo estas komplete prenata, premata, regata de ĉi tiu deziro "*ĝis ĉio estos plenumita*".

Do la deziro de Jesuo, kiu estas Dio, estas transdoni vivon al la homaro, kaj ĉi tiun vivon li transdonas pere de la donado de la Spirito. Kaj por klarigi la miskomprenojn, Jesuo diras: "*Ĉu vi pensas, ke mi venis porti pacon al la tero? Ne, mi diras al vi, sed dividon*". Jam Jesuo estis anoncita de Simeono al liaj gepatroj kiel tiu, kiu estos por la ruino kaj por la renaskiĝo de multaj, do signo de kontraŭdiro.

Estas nova rilato kun la Patro, kiun Jesuo venis anonci. Tiuj, kiuj akceptas lin, vivas samsente kun li, sed tiuj, kiuj male restos ligataj al la leĝo estos liaj plej sovaĝaj malamikoj. Kaj Jesuo, citante kun modifo la

profeton Miĥea-n, diras: "*Ekde nun en domo de kvin homoj, ili dividiĝos tri kontraŭ du kaj du kontraŭ tri*", sed, dum Miĥea skribis "*la filo ofendas la patron, la filino ekribelas kontraŭ la patrino kaj la bofilino kontraŭ la bopatrino*" do la novo kontraŭ la malnovo, Jesuo parolas pri kverelo inter la malnovo kaj la novo, inter la leĝo kaj la Spirito.

Do la kverelo estos de "*patro kontraŭ filo kaj filo kontraŭ patro, patrino kontraŭ filino kaj filino kontraŭ patrino, bopatrino kontraŭ bofilino kaj bofilino kontraŭ bopatrino*" sed ne temas pri kverelo inter gefratoj. Temas pri kverelo inter tiuj, kiuj restas ligataj al la antikvaĵoj, al la pasinta tempo, al la malnovo, kaj tiuj, kiuj akceptas la novon. Sed ne temas pri kverelo interna en la kristana komunumo.

Jesuo ne parolas pri kverelo inter gefratoj, de filo kontraŭ filo. En la komunumo ne estas divido, eĉ male la frukto de la Spirito estas ĝuste la paco. Luko ĉi tie aludas je la anonco, kiun la anĝelo faris al Zaĥaria pri la naskiĝo de la filo Johano, kaj la anĝelo faris tion citante la profeton Malaĥia-n sed cenzurante parton. La profeto Malaĥia estis dirinta, ke la agado de la Sinjoro estos tiu de *reportado de la koroj de la patroj al la filoj kaj de la koroj de la filoj al la patroj*.

La koro montras la menson. Do, temas pri la menso de la patroj al la filoj, tio estas ke maljunuloj devas akcepti la novon, sed la filoj devas akcepti la malnovon. Sed tamen Luko ne konsentas. La anĝelo fakte diras: Por reporti la patrojn al la filoj". La antikvo devas akcepti la novon kaj ne la novo la antikvon.